Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 3 (18), Marto 2006

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:
Membro-subtenanto $40/jare;
Familio $30; Regula $20;
Studento aŭ pensiulo $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to:
The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

Kunvenoj:
Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran **mardon** de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**
Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Mi longe cerbumis, kiel komenci la novan numeron de nia bulteno, sed hazarde estis ricevita la jena mesaĝo: "Karaj amikoj, mi esperas ke vi fartas bone! Delonge mi ne skribis al vi. En la lastaj du monatoj mi jam alkutimiĝis al la nova loĝloko – Frankfurto. En la lastaj tagoj miaj ciferecaj fotoj de la lastaj monatoj estis iom ordigitaj. Do, mi aperigis por vi la fotojn de la Zamenhof-festo en mia retejo. Vidu: http://ernst 23556.multiply.com/photos/album/ Samideane, Ernesto kun familio." Sendube, vi ekmemoris nian eks-sekretarion.
Dum la lasta monato estis starigitaj interesaj kontaktoj kun la E-klubo el Varsovio – nia ĝemelurbo, sed pri tio – en la aprila eldono. Nun translokiĝu al Azia kontinento, sur terenoj de la aliaj nia ĝemelo – Ŝanhajo.

Laste okazis

Lastan kunsidon de nia E-societo gvidis ĝia vicprezidanto d-ro Puramo Chong kaj la temo de lia prelego estis ligita kun lia faka agado – naturkuraca medicino. Antaŭ nelonge s-ro Puramo partoprenis laboron de 2-a Konferenco de INA – Internacia Naturkuraca Asocio, kiu okazis en Ŝanhajo, Ĉinio. Ĝis nun INA havis kutime nelongajn kunsidojn dum UK de UEA. Ne estis tempo por detale, sen hasto priparoli plurajn demandoj kaj problemojn pri INA-agado. Tiu kutimo estis rompita dank'al organizita 6-taga konferenco. La unuan fojon INA-anoj ne estis urĝataj liberigi la ejon kaj povis satkonversacii: ja je dispono de konferencanoj estis ejoj de Ŝanhaja Federacio de Soci-Sciencaj Asocioj. La aranĝo kunvenigis pli ol 40 naturkuracistojn kaj interesulojn, kiuj konferencis sub la temo "Maljuniĝo kaj Naturkuracado". Inter la partoprenantoj ankaŭ troviĝis du raportistinoj de Radio Pekino Internacia. Prelegis sep naturkuracistoj el kvin landoj en la teknike perfekte kaj lukse ekipita konferencejo. En la listo de la prelegintoj estis multaj estimataj ĉinaj profesoroj, ankaŭ tiuj el Germanio, Litovio kaj, sendube, prezidanto de INA – d-ro Chong. Inter temoj – aplikata kinesologio, tetrinkado, efiko de biero je homa sano, abelaj produktoj, ekzercado Tajĉiĉuan.
La lokaj organizantoj ne forgesis ankaŭ pri kultura programo kaj turismaj aranĝoj. Dankon al membroj de la Ŝanhaja E-Asocio.

Ŝanhajo – ĉina ĝemelo de Ŝikago

Ŝanhajo situas en la mezo de la marborda linio ĉe la influejo de la Jandzi' – la plej longa rivero en la Orienta Azio. En la urbo, kies totala

UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio
http://www.uea.org

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
http://www.esperanto-usa.org/

Free Esperanto Course on Internet
http://www.pacujo.nu/esperanto/course

Esperanto Viva - A free online course
http://www.mintex.demon.co.uk/espviva/angla/index.htm

Internacia televido en E-o
http://internacia.tv

Reta senpaga enciklopedio
http://eo.wikipedia.org

Esperantic Studies Foundation
http://esperantic.org

Pasporta Servo
http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm

Pola Radio en Esperanto:
http://www.wrn.org/audio/pol1.ram

Sekvantaj kunsidoj:

28an de Marto – XX datrevenon de Ĉornobila katastrofo en Ukrainio, informas Viktor Pajuk

25an de Aprilo – vizito de fama rusa E-poeto k kantisto Mikaelo Bruna Ŝtono (kun koncerto)

23an de Majo – pri siaj travivaĵoj en brazilaj ĝangaloj rakontos d-ino Gertrude Novak

27an Junio – espereble pri sia vivsperto en malproksima Irano rakontos nia nova membro

Atenton – ni kunsidos mardon, ne merkredon!



areo estas 6340,5 kv. kilometroj (ne mejloj), troviĝas 16 milionoj da loĝantoj.
Ŝanhajo estas la plej granda ekonomia, financa, komerca kaj navigacia centro de Ĉinio. La financa enspezo de la urbo en 2004 atingis 111.97 mlrd da juanoj. Nun oni energie disvolvas la novan distrikton Pudong. La ĝenerala celo por ĝi estas: en dekoj da jaroj konstrui komplete apertan, novan, multfunkcian kaj modernan distrikton de la monda nivelo.
Ŝanhajo estas la lulilo de la E-movado en Ĉinio, komence de la pasinta jc Esperanto jam estis aŭdata sur la stratoj de la urbo. En 1908 fondiĝis la plej unua E-organizo en Ĉinio, nome tie ĉi aperis en 1923 sola libreto de la renoma blinda e-isto Vasil Eroŝenko. Jen estas fragmento de lia poemo *Lulkanto*:

Ploras knabo, ploras kara,
Ploras en lulil'.
Li ne volas kontentiĝi
Eĉ je belludil'.
Ŝajnas, io lin timigas
En la noktmallum'.
Vidas ion li teruran
En mistera fum'.

Tremas li... ho, mia knabo!
Mia kara Ĥin'!
Kiaj nun fantomoj venis
Por timigi vin?
Ĉu timigas vin Japano
Kun pafil' en man'?
Ĉu vi timas, ke vin batos
Blanka Eŭropan'?..

Kuraĝaj ĉinoj refondis ŜEAn en 1982, pli ol 7000 homoj lernis IL-on en universitatoj kaj diversaj kursoj, organizitaj de l'Asocio. Kiel internacia urbo, Ŝanhajo ĉiujare akceptas pli kaj pli fremdlandajn e-istojn por turismo, komerco, scienca, teknika kaj kultura interŝanĝo. **Bonvenon!**

Dankon: al sinjoro Roman Dobrzynski pro lia filmo (en E-o) pri la pola urbo Malborko;
al milana E-klubo pro nova numero de bulteno *Infomilano*;
al varsovia klubo pro granda foto-informo koncerne nia societo;
al Freŝa Maro (Pekino) pro bulteno *Varma Espero.*

Utila informo

! Do You want to practice Your Esperanto by phone? **Mr. Byron Egiguren** will help You to achieve fluency in IL conversation. Call him: **(847) 446-6764**. He's a linguist and speaks several languages, including English and Spanish.

Armenaj e-istoj invitas partopreni Internacian Someran Lernejon, kiu okazos 2-9an de Julio en tiu antikva suna lando.

Odesanoj (Ukrainio), kie antaŭ nelonge okazis lingva festivalo *Ĉielarko de lingvoj,* invitas al tago de rido (1a de Aprilo) – *Aprilaj ridetoj*.

Ridu kaj estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!

araneoesp @ yahoo.co.uk